

John Ellerton,

## Finiĝas nun alia tago

*tradukita de William John Downes*

1. Finiĝas nun alia tago,  
jam venis la vespera hor'.  
Kunvenis ni por adorago  
plaĉanta al la Di-Sinjur'

2. Ni dankas Vin, Savanto nia,  
ke sur la tuta mond-teren'  
la sankta eklezio Via  
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo  
de ne-ĉesanta maten-glor'.  
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo  
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-subiro;  
gefratoj en la okcident'  
vekiĝas kun novtag-aspiro  
Vin glori per viv-elokvent'.

5. Formortos mondaj imperioj,  
sed Via regno kreskos plu.  
Al Vi sin cedos dinastioj,  
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

John Ellerton,

## Ni estis ja en mano Dia

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,  
dum brilis super ni la Sun'.  
Protektu nin per mano Via  
dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno  
de l' nova tag', ripozas ni  
dum tiu nokt' en Via beno<sup>2</sup>  
ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' fordronas  
la Sun' en tiu ĉi vesper',  
multvoĉe Via laŭdo sonas  
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta  
la Teron lumo de l' maten',  
senĉese estas plusonanta  
preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉiopova,  
senlima Via regno, nin  
konduku al la tago nova  
en Via regno je la fin'!

...

John Ellerton,

## Forpasis tiu tag', Sinjoro

*tradukita de Frieder Weigold*

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,  
Kaj profundigis la senlum'.  
Vi gardis nin de ajn doloro.  
Nin gardu ankaŭ dum noktum'!

2. Ni rotacias en la tagon.  
En nokta paco dormas ni.  
Kaj portas lumon trans la maro  
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno  
Briladas super tera rond',  
Eksonas laŭdo pro la beno  
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,  
Ja brilas en plu fora land'!  
La gloron, kiun ni admiris,  
Anoncas plu preĝada kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!  
Kaj sole staras via tron',  
Ke sole via regno restu  
Je fina tag' sub unu kron'.

...

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (\*1892 – †1987).*

*Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)*

*Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro "Adoru", eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.*

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.*

*Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)*

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).*